



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIU ROMA
ESTAS AL NI FREMO

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO
EN LA MONDON VENIS NOVA Sento
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO...

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jarabono : 80 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1994 — 1


(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La kastelo Plessis-Bourré kaj alĥemio ...



... Kaj, Champolion kaj la hieroglifoj

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatano :

Pierre Babin

ENHAVO

	paĝo
El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangeul)	2
Le Plessis-Bourré (A. Cherpillod)	3-4
Champollion (F. Boyet)	5-6
Pri ina vivsorto (S. Boniol)	7-10
Monstra mistifiko (B. Golden)	11-12
La derviŝo rakontas	13
Por via distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

Kiam vi legos tiun numeron de la revuo, la Kongreso de SAT-Amikaro estos tuj okazonta aŭ eĉ jam ĵus okazinta. La nombro da aliĝoj estis limigita pro la neebleco akcepti saman kvanton da partoprenantoj, kiel kutime en tiu Kongreso. Espereble la vetero ne devigos la hom-amason vivi nur interne. Despli ĉar la parko estas tiel bela en la printempo.

Tri semajnojn poste la pordoj de la kastelo malfermiĝos por akcepti geknabojn diversnaciajn. Ankaŭ ili ĝuos belan veteron ĉar dum libertempo, en Gresillon oni laboras kompreneble, sed ankaŭ ŝatas promeni kaj ludi, kiam oni estas ĉirkaŭ dekjara. Ni devas denove diri, ke tiu studperiodo ĉiujare sukcesas ne nur dank'al la sindonemo de la organizantoj (precipe de Paulette,

"ĉef-organizanto") sed ankaŭ dank'al la malavareco de multaj geamikoj, kiuj, regule, ĉiujare, donacas sumojn, pli malpli grandajn laŭ la eblecoj. Jam pensu pri la venontjara Infan-Renkonto; helpu nin denove venigi infanojn el neriĉaj landoj por ke, ankaŭ tie, kresku esperantismemon.

NI FUNEBRAS

En decembro 1993, post la apero de la antaŭa numero de KK, venis al ni la informon, ke mortis Hans. Hans Schütt estis por siaj multaj geamikoj grezilionaj, nur Hans. Ĉar dum tiom da jaroj li regule vizitis Gresillon, kiu, laŭ liaj diroj, fariĝis por li kroma hejmo. Ankaŭ la muroj la parko de la Esperanto-domo certe konservas iom da li en sia memoro.

Komence de la jaro malaperis amikino, kiu siatempe, kun sia edzo, instruis en Gresillon. Post la morto de Paul, Simone Guillot daŭre laboris per verkado de kurso, tradukado de tekstoj por nia revuo.

Ŝia partopreno en nia laboro estis tre valora. Al Jean-Paul, Alain kaj iliaj familioj, Gresillon kaj Kulturaj Kajeroj sendas siajn plej amikajn kondolencojn.

Esperanto tra la Mondo



EN UNESKO— Post la unuaj rezolucioj de 1954 kaj 1985, tria rezolucio pri esperanto estis akceptita en Unesko dum la ĝenerala konferenco, en Parizo, en novembro 1993. La iniciativo venis de la itala delegitaro dank'al la aktivado de la itala Esperanto-Radikala Asocio. La ĝenerala direktoro de Unesko, S-ro Federico Mayor, alportis sian subtenon kaj promesis fari ĉion eblan por ke la esperanto-projektoj ricevu lokon kaj subvencion, kadre de la programo "Linguapax".

EN ITALIO— La itala ministerio pri publika instruado starigis komisionon por studi la eventualan enprogramigon de esperanto en la italajn lernejojn.

EN ĈINIO— La 4-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en esperanto, laŭ la ĉefa temo "Scienco, Tekniko kaj nova jarcento", kun komerc-negoca kunsido, okazos en Beijing, (10-a - 17-a de julio) Samtempe okazos sesio de Akademio de la Sciencoj San Marino kaj la 2-a internacia seminario "Survoje al ekologia etiko".

EN IRANO— La instrua vic-prezidanto de la Shahib-Behesti-Universitato de Teherano, prof. d-ro A. Shahvarani, sendis mesaĝon al ĉiuj fakultatoj, en kiu li rekomendas, ke "esperanto estu unu el la elekteblaj instru-fakoj por la licenciaj studentoj".

EN KOREIO— La ĉeftemo de la 79-a universala kongreso, en Seulo, estos "Azio en la Mondo". La alta protektanto de la kongreso estos S-ro Lee Mansup, prezidanto de la Korea Nacia Asembleo.

La jubilea 50-a Internacia Junulara Kongreso okazos la sekvantan semajnon en la universitato Dan Kook en Ch'onan, sude de Seulo.

Internacia Ligo de esperantistaj Instruistoj kongresos proksime al Seulo, post la U.K. pri la temo: "La azia kontribuo al tutglobaj edukado kaj kulturo". Samtempe okazos E-lingva gimnazio por gejunuloj.

EN LITOVIO— Fine de la lasta jaro, en ĉeesto de S-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de esperanto, estis oficiale inaŭgurita en Kaŭnas, la Esperanto-Domo, iama loĝdomo de A. Zilbernik, bopatro de D-ro Zamenhof. La domon, tute restaŭritan, donacis la registaro al la Esperanto-Asocio. La eduka ministerio akceptis esperanton, kiel elekteblan lernejan studobjekton.

EN FINNLANDO— En 1995 la universala kongreso de esperanto okazos en Tampere kaj la kongresa komitato jam povas liveri la afiŝon de la kongreso. Dum tiu kongreso, por la 50-a datreveno de Unuiĝintaj Nacioj, estas planite okazigi "UN-sembleeton", kiu agos dum unu tago, kiel modelo de la vera Ĝenerala Asembleo de UN. Interesatoj, prefereble gejunuloj inter 16-26 jaroj, kontaktu: Geoffrey Greatrex, Exeter College, Oxford, OX1 3DP, Britio.

EKOLOGIO— Fakdelegitino de UEA, May Bijleveld, R. Sta. Aleksandrina 481, ap. 606, BR-20261-232 Rio de Janeiro, RJ Brazilo, atendas proponojn por plibonigi sian planon "Pliverdigi la verdulojn", kiu celas estigi kunlaboron por esperantigi medi-protektantojn.

EN ĈEĤIO— Akademio de esperanto okazigos en Prago, de la 7-a ĝis la 14-a de julio kolokvon pri "La stato kaj estonteco de la internacia lingvo esperanto". Riĉa, kultura kaj turisma programo por la akompanantaj personoj, parte komune kun SAT-antaŭkongreso. Inf. "Kava-Pech", Anglicka 878, CZ-2522 Dobrichovice, (Prahazapad), Ĉeĥio.

EN ITALIO— En du italaj elementaj Ternejoj en Torino, komenciĝis propedeŭtika esperanto-instruado por infanoj en kvin duagradaĵ klasoj. La sepjaruloj lernas la internacian lingvon dum du lernojaroj, en la dua kaj tria klasoj. La celo de tiu agado estas propedeŭtika preparo por la sekva instruado de fremdaj lingvoj (franca kaj angla).

Le Plessis-Bourré kaj alĥemio

En la kamparo Anĵua, en tiu regiono tiel riĉa je kasteloj, la amatoroj de belaj ŝtonoj povas vidi loĝejon tute malsaman de la aliaj. Loĝejon kiu valoras, ne nur kromvojon, sed vojaĝon intence faritan tiucele. Ĝi estas LE PLESSIS-BOURRE, "konsiderata", skribis la kronikisto Jehan de Bourdigné, kiel la plej favora kaj la plej bele konstruita el la kasteloj de Francujo, pro ĝiaj entenaĵoj". Ĉe la fino de vastaj herbejoj, la kastelo aperas tute blanka, en sia impona severeco, sub siaj tegmentoj el anĵuaj ardezoj. Neniu modifo aliigis ĝin dum la pasado de la tempo; la vizitantoj ricevas la saman impreson, kvazaŭ ili admirus ĝin ĉe la fino de la XV-a jarcento. Kvincent-jaroj ne malfreŝigis la belan helan koloron de la ŝtonoj, kaj ĝuste tio donas al tiu kastelo ĝian mirigan junecan aspekton. Ĝi havis ankaŭ la fortunon, ke ĝi travivis la francan Revolucion sen grava difektiĝo.

La bieno estis unue konata sub la nomo Plessis-de-Vent (Plesseium venti). En malnova franca lingvo "plaisse" aŭ "plaisseis", de la latina "plectere" (=plekti) estis "heĝo", aŭ tereno ĉirkaŭata de heĝoj. Ĝi estis aĉetita de Jean Bourré en 1462. La nova posedanto konstruis la ankoraŭ nun admiratan kastelon, kiu estis klasita "historia monumento" la 1-an de junio 1931, kune kun siaj du hektaroj da fosaĵoj kaj la avenuoj alvenantaj al ĝi.

Plessis Bourré estas la tipo de la transiraj kasteloj. Tio vidiĝas el la dato de ĝia konstruo: 1468-1473. La Mezepoko ĵus finiĝis kaj ankoraŭ ne tute lasis lokon al la Renesanco. Ĝi ankoraŭ mezepoka estas per sia fortresa aspekto. Kvar turoj staras ĉe la anguloj: la sudorienta estas la ĉefturo, 44 metrojn alta. La muroj estas du metrojn dikaj. Ĉe ilia bazo, platformo larĝa je tri metroj ebligas la pafadon de la defenda artilerio,

kio cetere estas unu el la originalaĵoj de tiu kastelo. Oni transpasas la larĝan ĉirkaŭfosaĵon per tri pontoj. La lasta estas 43 metrojn longa, kaj ĝi finvenas per duobla levponto al la fortika pordego de la kastelo. La restaŭrado de tiu levponto ebligas nun, ke oni vidas ĝin en bona stato de funkciado.

.... Kiu estis Jean Bourré?... Lia samtempulo Philippe de Comynes mencias lin nur tute akcesore en siaj "Memoraĵoj", kvankam li konis lin bone... Li naskiĝis en 1424 en Château-Gontier, malgranda urbo situanta iom pli norde. Lia patro, bonhava burĝo, estis drapisto. Post juraj studoj en la Pariza universitato, Jean Bourré eniris je la servo de la daŭfeno Ludoviko, la plej aĝa filo de Karolo VII-a.

Li akompanis lin en Daŭfenujon kaj poste pasigis kun li kvin jarojn en la kastelo de Genappe, en Brabanto, en la kortego de Filipo la Bona, duko de Burgonjo. La biblioteko de la duko de Burgonjo estis tiam fama pro la nombro kaj la kvalito de la libroj, kiujn ĝi entenis. Pli poste ĝi estiĝis la kerno de la Reĝa Biblioteko de Belgujo. Verŝajne, tie Jean Bourré akiris sian vastegan scion kaj formis sian artan guston.

Ludoviko la XI-a iĝis reĝo kaj nomumis Jean Bourré, sinsekve, notario kaj sekretario de la reĝo, mastro de la kontoj, kontrolisto de la reĝa Kancelario, kontrolisto de la elspezoj en Normandujo. Li nobeligiis lin en 1465 sub la nomo "du Plessis".

Jean Bourré konstruigis plurajn kastelojn kaj plezurdomojn, ĉefe en Anĵuo. Ĉar zorgoplena pri la kvalito, li uzadis nur zorge elektitajn materialojn, eĉ se por tio li devis multekoste venigi la ŝtonojn de ŝtonminejo apud Saumur.

Ĉe la morto de Ludoviko la XI-a Jean Bourré restis unu el la plej obeataj konsilistoj de lia filo kaj posteulo Karolo la VIII-a. Li konservis la oficon de ĝenerala trezoristo de Francujo. Post la morto de Karolo la VIII-a la nova reĝo Ludoviko la XII-a daŭre petadis lian helpon kaj liajn konsilojn.

Li mortis en 1506, okdek-tri-jara. tamen, la kopiisto de lia testamento asertis, ke sinjoro du Plessis "atingis la aĝon de cent jaroj, aŭ proksimume". Ĉu estus eraro pri la naskiĝdato aŭ pri la mortodato? Lian koron oni enfermis en arĝentan kesteton kaj deponis en la kastelan kapelon; lian korpon oni enterigis en la preĝejo de Jarzé, apuda urbeto, kie li konstruigis alian kastelon.

..... De kie Jean Bourré havis sian mirinde grandan riĉaĵon? Estas certe, ke la profitoj, de lia ofico estis grandegaj. Sed ne ŝajnas, ke tiuj profitoj povis esti la ĉefa kaj sufiĉa kaŭzo de tiu riĉeco. Efektive, ĝi estis tiel granda, ke ĝi estiĝis kvazaŭ anekso de la Reĝa Trezoro, kaj ke Ludoviko la XI-a tute senhonte ofte ĉerpis el ĝi. Jacques Coeur, la granda financisto de la antaŭa reĝado ne postlasis atestatan paperon, sed malkaŝis la originon de sia grandega riĉeco en la priskriba dekoracio de sia palaco. Ŝajnas, ke Jean Bourré agis same. La fama plafono de la salono de la gardistoj de Plessis-Bourré instruas nin: la riĉeco de sinjoro du Plessis venis de la praktikado de alĥemio. La alĥemiistoj pretendas, ke ili kapablas prepari iun substancon, nomatan Filozofa Ŝtono, kapablan transformi la neperfektajn metalojn (plumbo, stano, kupro,..) en perfektajn metalojn (oro, arĝento).

Ĉar la granda alĥemia arto havas, kiel bazon la personajn rilatojn inter la Naturo kaj la Adepto la principoj povas esti iom malsamaj de unu Adepto al alia. La deirpunkto estas tamen, ke la materio estas unu. La nocio de atomo ne estis agnoskata de la Adeptoj, kiuj kredis je la ekzisto de materio unu, troviĝanta en la Naturo sub du formoj: maskla, nomata "Sulfuro de la Filozofoj" kaj femala formo nomata "Merkuro de la Filozofoj". Sed tiuj vortoj havas nenion komunan kun tio, kion ni nomas ĝenerale sulfuro kaj hidrargo, kaj ke maskla kaj femala neniel rilatas al biologio... La alĥemiistoj daŭre asertadis, ke la formiĝadon de metaloj en la tera krusto oni

povas kompari kun la formiĝado de planto el grajno, aŭ kun la formiĝado de fetu el fekundigita ovo. Kaj tiun procezon la homoj povus reprodukti ege pli rapide, helpe de substanco kiu ludus katalizan rolon, la "Filozofa Ŝtono".

.....Nun ni revenu al la plafono de la "salono de la gardistoj" de la kastelo Plessis-Bourré. Ĝi konsistas el ses grandaj kasonoj disigitaj per traboj. Ĉiu kasono siavice entenas kvar pli malgrandajn kasonojn, malregule sesangulajn, ĉirkaŭ centra lozanĝo, kio finvenas al dudek kvar kasonoj entute. Inter ili, ok (ĉe la kamena ekstremo) entenas versajn legendojn en franca lingvo. La dek ses aliaj montras sendube alĥemiajn simbolojn, kies kompreno estas tute ne simpla. Tiuj dek ses paneloj estis detale pristudataj de Eugène Canseliet inter 1945 kaj 1950, kiu skribis preskaŭ ducent paĝojn pri tiu plafono. Sed ne estas tre facile traduki klarlingvaĵe konceptojn, por kiuj klara lingvaĵo ne estas farita. Ni do nur priskribos la ĉefajn panelojn.

La du virŝafoj, kiuj alfrontas sin reciproke, ŝajnas simboli la du naturojn, t.e. la altiriĝon, kiu ekzistas inter la tera subjekto kaj la ĉiela fluo. La ursino kaj la du simioj: la ursino elvokas la poluson, celon de la irota vojo; el la simioj unu estas la Saĝulo la alia la Frenezulo, kontraŭaj elementoj. La dresita unikorno kiun povas kapti nur virgulino montras la purecon necesan por celi la Grandan Faron. La batalo de la aglo kun la leono simbolas la batalon de la du naturoj: la leono estas la masklo, la fikso, la seko, t.e. la Sulfuro; la aglo estas la femalo, la volatilo, la malseko, t.e. la Merkuro.....

La elementoj de tiu artikolo estis elĉerpitaj el "Le Plessis-Bourre kaj alĥemio" verkita de André Cherpillod, samtempe riĉa libreto kaj utila gvidilo.

CHAMPOLLION

KAJ

la hieroglifoj

Kutime, kiam oni aludas pri Champollion (Sampoliono), oni simple diras, ke li sukcesis eltrovi la signifojn de la hieroglifoj; dank'al speciala ŝtono, sur kiu estis la sama teksto en tri skribsistemoj: hieroglifoj, demotika skribo kaj greka skribo. Fakte, la afero estas pli malsimpla. La fama ŝtono estis elportita el Egiptio, kiam Bonaparte militiris al Egiptio en 1798, kaj ĝi estis konservita en la Brita Muzeo ekde 1801. Post tiu vojaĝo en Egiption, en kiu multaj sciencistoj partoprenis, elvolviĝis nova scienco: egiptologio. La svedo Davido Aokerblad, per uzo de la greka teksto estis trovinta la proprajn nomojn en la demotika teksto kaj proponinta 16 literojn; sed li ne pensis, ke egipta lingvo povis noti nur la konsonantojn. La angla kuracisto Tomaso Young (Jung), kiu cetere estas fama pro diversaj eltrovoj: ondo teorio pri la lumo, rolo de la kristalino de la okulo... publikigis en 1819 en "Encyclopedia Britannica" iun liston de 218 vortoj en la demotika lingvo, kaj 200 hieroglifojn. Sed se la demotikaj vortoj estis klaraj, la hieroglifoj ne estis klarigitaj.

Antaŭ ol daŭrigi tiun rakonton necesas iom reveni al la historio de Egiptio. En la tre antikva tempo, ekzistis pluraj faraonaj imperioj. El tiu epoko restas gravuraĵoj sur la monumentoj. Tiuj gravuroj estas nomataj "hieroglifoj" pro la grekaj radikoj: "hiero"= sakrala, kaj "glufen"= gravuri. Kiam en -332 la greko Aleksandro konkeris Egiption, la tieaj homoj skribis sur papiruso, pere de du skribaj sistemoj: la hieratika skribo (greke: "la skribo por la religiaj aferoj") kaj la demotika skribo (greke: "skribmaniero de la popolo"). Iom post iom, la egiptoj uzis la grekan lingvon. La romianoj siavice konkeris la landon, kaj tiam, dum reĝis la Ptolemeaj suverenoj, kaj ankaŭ

poste, oni uzis la grekan lingvon por la administrado, sed por la religiaj aferoj, oni ankoraŭ uzis la hieratikan skribon sur papiruso kaj hieroglifojn sur la monumentoj. Tio daŭris dum la romia periodo, kiu favoris la uzon de hieroglifoj, por apartigi la egiptan pastraron de la cetero de la popolo kaj ĝis la momento, kiam la kristana imperiestro Teodozo malpermesis ĉiujn nekristanajn religiojn en 392. De tiam oni ne plu uzis hieroglifojn, ĉar ne plu estis konstruitaj egiptaj temploj. Iom post iom la demotika skribo pluvivis, sed poste la egiptoj uzis la grekan alfabeton por skribi sian lingvon, kiun oni konas sub la nomo de kopta lingvo. La vorto "kopto" montras egiptan kristanon, kiu estas en la sekto de la monofizitoj. La monofizitoj opinias, ke estas nur unu persono en Kristo, la dia parto sorbis la homan. Konsilio kondamnis tiun herezon en 451. Kelkaj eklezioj, inkluzive de la kopta, restis monofizitaj kontraŭ la eklezio de Bizanco. La kopta lingvo estis uzata ĝis la 18-a jarcento post Kristo.

Nun iom pri la homo: Johano Francisko Champollion naskiĝis en 1790, en Figeac (Fiĵak), Francio. Li estis liceano en Grenoblo kaj venis en Parizon en 1807 por studi la antikvajn lingvojn. Li jam opiniis, ke la kopta lingvo estis malfrua formo de la lingvo de la antikvaj egiptoj. Li studis, krom la lingvoj latina kaj greka, la persan kaj la koptan lingvon. Li speciale studis la tiel nomatan: "ŝtonon el Rozeto", sur kiu estis teksto en tri lingvoj. Pri la greka teksto, oni tute konis ĝin dank'al la fakulo Letronne; pri la demotika skribo, oni disponis ekde 1819 pri la laboroj de la anglo Young. Pri la hieroglifoj oni nur sciis dube legi la nomon de Ptolemeo. Champollion jam estis studinta la landon kaj publikiginta geografion de Egiptio kaj gramatikon pri la kopta lingvo. Ekde 1821, li provis starigi vortaron pri la tri egiptaj skriboj: hieroglifa, hieratika kaj demotika, sed tiam li opiniis ideografia la hieroglifan skribon.

Do en 1821, Champollion verkante tiun vortaron, konstatas, ke la tri skriboj apartenas al la sama sistemo, en kiu estas pluraj centoj da signoj. Uzinte demotikan tekston li opinias, ke li sukcesis trovi la hieroglifan formon de la nomo "Kleopatra", sed li dubas, kaj ne kapablas kontroli tion. Tiam Champollion havas simplan ideon: nombri la signojn de la ŝtono de Rozeto. Dum estas 486 vortoj laŭ la greka teksto, oni nombras 1419 hieroglifajn signojn. Konkludo: la hieroglifa skribo ne povas esti ideografia. Ĝi devas montri sonojn pere de desegnoj, kaj eventuale la saman sonon povas montri diversaj desegnoj. Krome Champollion, kiu konas aliajn semitajn lingvojn opinias, ke eble en la hieroglifa skribo, oni ne notas la vokalojn.

En januaro 1822 Champollion ricevas de Anglio iun hieroglifan skribon, kiu venas de Filaea obelisko, sur kiu li rekonas la nomon "Kleopatra". Per komparo inter la nomo "Ptolemeo" (el la rozeta ŝtono) kaj la nomo "Kleopatra" el la obelisko de Filae, Champollion eltrovas 12 fonetikaĵojn. Per komparo kun la kopta lingvo, li malkovras, ke la egiptoj uzas signon, kiu montras objekton (ideogram) ne por montri tiun objekton, sed iun vokalan aŭ plejofte konsonantan sonon, kiu estas en la nomo de la objekto (plej ofte la unua). Ekzemple la signo "laboi", kiu signifas "leono", montras la sonon "l" kaj la signo "tot", la "mano", montras la sonon "t". La 26-an de julio 1822 li montras, ke la steloj, kiuj estas desegnitaj estas uzataj por distingi inter la vortoj samsonaj, ke temas pri stelo kaj ne pri samnomaj reĝo aŭ dio. Tiaj desegnoj, ne partoprenas en la sona ĉeno; ili estas nur determiniloj.

La 14-an de septembro 1822, Champollion ricevas desegnojn, kiuj venas de la templo en Abu-Simbel. Li tie trovas la sonon "mes", kiu apudas sunan signon. Ĉar la nomoj de la suna dio estas "Ra" aŭ "Re", li serĉas, kiun nomon de reĝo (ĉar la desegno montris, ke temas pri


reĝo) similas al "Ra-mes"...kaj fine li pensas pri "Ramses"... kaj per la sama metodo, li konstatas, ke sur la monumento ekzistas diversaj hieroglifoj por esprimi denove la nomon de Ramses, kaj tio pravas la ekziston de homofoniaj hieroglifoj. Li malkovras la nomon de "Toutmes" per la sinsekvo de la signo de la dio "Tot" kun la sama sono "mes". Ĉiu malkovro estas grava, ĉar de tiam Champollion scias, ke lia sistemo valoras ne nur pri la romia epoko (Ptolemeo, Kleopatra) sed ankaŭ funkciis en la tempo de la meza imperio. Je la fino de novembro 1822, li jam trovis la nomojn de 33 reĝoj de la periodo de la faraona epoko (antaŭ la konkero fare de Aleksandro).



hieroglifa skribo



hieratika skribo



demotika skribo

(daŭrigota)

PRI INA VIVSORTO DUM MEZEPOKO KAJ RENESANCO

(fino)

Apero de urba civilizacio- De la XII-a ĝis la XIII-a jarcentoj urboj laŭvice malligiĝas el feŭda protektado; Ni ne forgesu mencii la subtaksatan, tamen elstaran influon de du revoluciaj teknikaĵoj: la ŝultrojungilo, kiu ebligas la ŝarĝobestojn labori pli efike, kaj la akvomuelilo, kiu malpliiĝas la pistolaboron. Tiuj du elpens-aĵoj ege helpis al inoj, ofte rolantaj en terkultivado kaj grenekspluatado same kiel bestoj.

Civilizacion plejparte kamparan postvenas urba civilizacio; rangigitan socion anstataŭas socio sur egalrajteco kaj reciprokeco bazita; unuvorte estiĝas servinterŝanĝa sistemo kaj monrimeda ekonomio. La kavaliroj cedas la lokon al la komercistoj. Ekestas nova klaso: la burĝaro. Tia civilizacia tipo promocias virinon, kiu akiras civilajn rajtojn. Ŝi iom partoprenas en politikaj aferoj. La komunumo kunigas la posedantaron, ĉiu fajrejestro ricevas voĉdonan rajton. Kelkloke vidvinoj kaj senedzaj memstarulinoj partoprenas en komunumaj kunsidoj, sed oni malpermesas, ke ili estu deputitinoj aŭ skabeninoj. Tamen vilaĝaj frataroj viraj foje elektas virinon, kiel estrinon. Dum la ĉiopova korporacia epoko inaj organizaĵoj, pere de siaj metiaj juĝantinoj, pligraviĝas. Profesiaj eblecoj konsiderinde plilarĝiĝas. Virino plenrajte praktikas sendependan metion aŭ fariĝas asociatino de la edzo. Pli poste reĝaj ordonoj favoraj al vidvinoj permesos, ke ili daŭrigu la edzan aktivecon kaj ĝuu ties privilegiojn. Metiista laboro alprenas familian aspekton: metiisto instruas sian lertecon al la gefiloj; sendiskute la filinoj envenas la patran laborejon. Sabine von Steinbach postdaŭrigos la patran laboron, kiel skulptistino en Strasburge katedralo. Ambaŭseksaj metioj estas multnombraj kaj krom tio oni kalkulas 150 inajn metiojn. Virinoj deĵoras en ĉiuspecaj vestometioj, brodas arĝent- kaj or-fadene. Tia ĉefverko kia estas la fama tapet-brodaĵo

en Bayeux muzeo ŝuldiĝas al skipoj da spertulinoj. En teksindustrio ili prilaboras drapaĵojn, ĉu hejme ĉu laboreje, ŝpinas, teksokombas, tinkturas; tamen estas al ili malpermesite fuli pro troa lacigo. Ĉetere pli da inoj ol da viroj oni kalkulas en brokantado kaj nutrokomercado. Ankaŭ ledon kaj metalon ili prilaboras, fabrikas tondilojn kaj kudrilojn. Aldone al panfarado, bierfarado, laktopreparado, ili estas gastejestrinoj. Ĉetere ampleksa laboristinaro deĵoras en konstruejoj, fabrikas morteron kaj ĉartransportas krudmaterialojn; eĉ en minejoj ili laboras en Britio dum la XV-a jarcento, sed iliaj salajroj estas ege pli malaltaj ol la viraj.

Dank'al sia profesia aktiveco virino akiras iom da klereco. La amaso estas plej parte seninstrua ĉar tiam esti instruita gravis nur por la klerikaro. Ofte en metikontraktoj estas menciite, ke geestroj sin trudas instrui siajn metilernantojn pri legado, kalkulado, desegno, aŭ allasas al ili la permeson frekventi kursojn. En Parizo troveblas privataj lernejoj sur strato "du Fouare" (la nomo devenas el tio, ke oni tie dissternis fojnofaskojn por ke la lernantaro povu sidi.) Sed skribado estis taksata tekniko kaj pro tio oni devis sin turni al skribisto. Kutime ekzistis lernejo apud ĉiu katedralo. Dum la XIII-a jarcento ununura lernejo porknabina estis fondita en Parizo ĉe "rue aux Ours". Bonhavaj junulinoj estis edukataj en monaĥinejoj kaj oni finedukis ilin la hejme dank'al instruistinoj aŭ kapelestroj. En Francio oni ne kalkulas studentinojn en universitato sed, en Italio, ekde la XI-a jarcento, ekzistas medicina instituto, kiu aljuĝas diplomojn ankaŭ al virinoj. Dum la XIV-a kaj XV-a jarcentoj, en Frankfurto, dekkvino da virinoj praktikas medicinon kaj kelkaj famiĝas, kiel okulkuracistinoj.

Ne enprofundiĝante en jurfakan labirinton ni tamen menciu preterpase

harhirtigan retropaŝon al Bruĝo dum la XIV-a jarcento: edzo rajtas batpuni sian edzinon, ŝin tranĉvundi de kapo ĝis piede, varmigi siajn piedojn en ŝia sango; leĝorompon li ne kulpas kondiĉe, ke li rekudru ŝin kaj ke ŝi tion postvivu!

Pri eklezio kaj virino- Oni rimarkas ambaŭflankecon kaj konstantan osciladon inter Maria-koncepto kaj Eva-koncepto. La eklezio klopodas rangaltigi virinon, sed samtempe pluigi ŝian jarcentdaŭran regatecon, kiu laŭopinie kongruas kun konvena ordo. La kanonjuro agnoskas ambaŭseksan egalrajtecon laŭ spirita vidpunkto, sed precizigas, ke subula estas ina surtera pozicio. Oni ekskludas ŝin el la pastraj funkcioj, ekleziaj juĝejoj, ktp. Oni ne pretekstu bibliajn precedencojn por transpaŝi la regularon: la malnova testamento eksvalidiĝis; ĝin anstataŭas la graca reĝimo, en kiu, pro la prapeko, virino kondukis Kriston al la kruco. Pro tio ŝi devas aspekti humila. Tamen fakte pli granda fleksebleco regas: reĝinoj kaj regentinoj aliras oficojn eĉ spiritajn kun jurisdikciaj povoj. Kanonjuro strebas limigi abatinajn povojn per vira reganteco, plejparte episkopa, sed abatinoj ja heredis diakoninajn povojn; kelkaj eĉ absolvis siajn monaĥinojn ĉe konfespreno. Abatinoj, kiel dirite, estis veraj ekleziaj altrangulinoj, kunvokante kunsidojn, juĝante eĉ klerikojn pere de siaj konfidatoj. Ĉiuj ni, Esperantistoj, aŭdis pri la fama abatino Hildegard, germana mistikulino, kiu la unua prilaboris planlingvon. En Fontevrault, ne malproksime al Gresillon, Robert d'Arbrissel fondis ĝemeligitan abatejon, kies abatino devis esti, ne virgulino kiel kutime, sed vidviniĝinta. Monaĥinejo estis promocio rimedo por virino: monaĥinoj scipovis legi. Ili verkis multifacetan literaturon: poemojn, meditetekstojn, preĝojn, enciklopediajn kaj mistikajn verkojn, poredukajn kaj historiajn (laŭ tiama koncepto) librojn. Ili korespondadis kun princoj kaj papoj. Favora eklezia agado ankaŭ notindas sur geedziĝa kampo. Ĝi daŭre insistas pri la nepra neceso de interkonsento geedza por ke geedziĝo plenalidu. kristana familio fundamentas ne

sur edza aŭtoritato sed sur geedziĝa sakramento. Tamen la kanonjuristoj estas obsedataj de la frazo de sankta Paŭlo eldirita: "Viro estas kapo de ino".

Ni emfazu la iom mirigan por ni eklezian sintenon koncerne geedzecojn: sangadulto, t.e. geedziĝo inter du parencoj ofte malproksimaj, estis ripete kondamnita kaj severege punita; dume surkampe de ekgedziĝo oni estis tolerema kaj la t.n. sangadulto ofte fariĝis preteksto por ekgedz(in)iĝo.

Solvirinoj- Al ili oni rilatas diversmaniere. Por senhavaj junulinoj, senedzaj solulinoj, fondiĝas beginejoj, specoj de malgrandaj komunumoj en privataj domoj situantaj, duonmonaĥinejoj, duonlaborejoj, sub la religia regateco. Tiaj establoj plejmulte disfloradis en Germanio kaj Flandrio en la XIII-a kaj XIV-a jarcentoj.

Prostituitinojn oni taksis ne forperditaj knabinoj sed misvojigitaj ŝafinoj. Ili estis rajtigitaj fondi korporacion kun privilegioj. Buleo datiĝanta de la jaro 1198 promesas plenan pekabsolvon al tiu, kiu edziĝas je stratulino. Tri religiaj ordenoj fondiĝas por ilin savi. Kiam oni ekkonstruis la dipatrinan katedralon en Parizo, ilia korporacio oferdonis grandan monsumon por aĉeti ĉu vitralon, ĉu multekostan pokalon. Jen granda embaraso por la klerikoj!

Ni rimarku, ke la eklezio celas inan promocion sed ne ties emancipadon. Mezepoke klerikoj elmontradas enradikiĝintan antaŭjuĝon: virino estas de ili perceptata, kiel tentantino, satana fiservantino, kiu delogas la monaĥojn. Pro tio la monaĥa regularo starigas nesupereblan baron inter monaĥoj kaj virinoj: servaj fratoj devas forpeli almozpetantinojn ĉeporde de monaĥejoj. Apogante sin sur aristotela teorieco sankta Tomaso demonstras inan malsuperecon: ĝi estas natura manko. Dum viro estis laŭplane kreata por plenumi racian agadon, virino estis kreata nur por naski. Kaj eksci, ke mezepoke, se virino spertis dumamoran ĝuon, eĉ kun la edzo, ŝi mortmerite pekis. Por malhelpi,

ke la klerikaro amoru, oni prikonsilis ilin vigle bildigi al si inan internajan putriĝon. Ĉi-okaze ni iom priparolu la "sorĉistinan demandon". Sorĉado ofte konsistis el reciproka kunhelpado malkoncipa aŭ abortiga; ankaŭ el sekreta kontraŭo al la ĉiopova klerikaro. Aliflanke kontraŭ-sorĉa ĉasado esprimis viran timon kontraŭ iaspeca mistera, neklarigebla virineco. Ĝi estis kvazaŭ memdefenda reflekso. Dum la XVI-a jarcento, sorĉistinaj procesoj plinombriĝis: iu inkvizitoro bruligis 900 laŭdiritajn sorĉistinojn kaj fieris pro tio...

Fakte kontraŭina sinteno plifirmigis dum la XIII-a kaj la XIV-a jarcentoj. Laŭlonge de la 18 000 versoj, per kiuj Jean de Meung plilongigas la tiel nomatan "Roman de la Rose" de Guillaume de Lorris tute alietose komencita, li malsuprenprenas virinon de alta ĉevalo sekve de profanaj argumentoj. Kiam burĝa konceptaro ekregas, ina rolo estas malaltigita: nur por fariĝi monaĥino ŝi lernas skriboarton; aliookaze nur per mastrumado kaj obeemo ŝi kontentiĝu. En Pollando, dum la XIV-a jarcento, junulino sin vire vestas por viziti la universitaton en Krakovo; post du jaroj oni malkovras la ruzaĵon kaj ekskludas ŝin.

Apero de virinismo- Kristina de Pisan (1363-1431) senlace pledas por virina instrurajto. Ŝi enkondukas italan etoson transalpen kaj inaŭguras eraon de ina protestado. Ŝi naskiĝis en Venecio, vivis en Parizo en lukso kaj komforto kaj tie ricevis zorgan edukon kaj instruon en libera etoso. Sed, junaĝe, ŝi, preskaŭ samtempe, perdas la patron, vidviniĝas kaj, en soleco, devas eduki siajn gefilojn kaj kontraŭbatali siajn kreditorojn. Ŝi estas la unua verkistino, kiu sin vivtenas per verkado, kiel kronikistino en burgundia kortego. Ŝi defendas inan kondiĉon sed kadre de tradicio kaj religio; ŝi ja ne estas malordigemulino. Ŝi nur petegas instrurajton por knabinoj same kiel por knaboj.

Renesanco naskiĝis surborde de Tiberio kaj Arno riveroj, en svarmado de vivo kaj lumo; ĝi disvastiĝas tra nebulaj landoj, kie ĝi estos sufokata de kontraŭa idearo. Liberon naskanta, Renesanco leviĝas

subsigne de platona filozofio kaj ina idealigo. Sed kie ĝi estiĝis, tie ĝi sinkos en diboĉadon kaj fivirinan regadon. Naskante kontraŭdirojn ĝi ekstarigas virinan emancipadon sed samtempe malliberigas virinon. Ĝi malfermas antaŭ ŝi reĝan vojon de intelekta kulturo, sed samtempe starigas racian mondon tipe viran, sciencan kaj teknikan. En la momento, kiam la okcidentaj landoj kovriĝadas per katedraloj, en Italio disfloras palacoj laŭ princa gusto elpensitaj. Gravaj riĉaĵoj kaj ekstera pompo. Iu enfokusiĝas en kortega vivo, al kiu ŝi donas propran impulson kaj stampon. Ŝi malkrudigas, ekzaltas, alportas konversacian arton kaj vivarton sur afableco bazitan. En Francio kortega vivmaniero tia komenciĝas sub Ĥna el Bretonio. En Italio, Medicis dinastio enscenigas la nobelulinon, la palacan damon; ĉiuspecajn artofakojn ŝi devas koni, studi muzikon kaj pentroarton. Junaĝe edziniĝontaj, la knabinoj ricevas fruan rapidigitan edukon. Nur dektrijara, Mary Stuart eldiris unuan latinlingvan paroladon. Reĝino Elizabeta ĉiutage dediĉis kelkajn minutojn al legado de antikvula verko. La Akademio fondita de Karlo la naŭa malfermiĝas al virinoj.

Guillette Pernet el Liono estis la unua verkistino burĝa, misfamigita, same kiel Louise Labé, kiu verkas laŭ petrarka stilo kaj sentas sin same bone rajdante, versfarante aŭ mastrumante; ŝiaj konfitaĵoj estis prilaudataj samgrade, kiel ŝiaj sonetoj. Sed ili estis esceptoj kaj tia agado neniel ŝanĝis la inan vivsorton. Kompreneble nur elito alproksimiĝis al mensaj scikonoj.

Sed lernejoj ekmalfermiĝas al knabinoj. La ursulina ordeno fondiĝas cele al edukado de knabinoj. En Germanio, dum oni fermas monaĥinejojn, reformaciaj adeptoj malfermas lernejojn porknabinajn kaj, en Strasburgo, instruado fariĝas deviga por ambaŭ sekuloj.

Ina beleco estas prikantata, kiel rebrilo de supera harmonio. Iu estas ekzorczita el ĉiaspeca kompliceo kun inferaj potencoj. Plie, ne la naturo faris el ŝi neperfektan estaĵon, sed la socio sekve de siaj kutimoj. Sed en tiu

idealisma fiaro enmiksiĝas karna ekzaltiĝo. Oni neniel bridias volupt-amon eĉ ties troigon.

Renesanca periodo karakteriziĝas per kontraŭdirada svarmado: ambaŭ reformacio kaj kontraŭreformacio restarigas geedzegan valoron. Virgeco ne plu estas virto unuaranga. Pastoroj edziĝas. Okaze de koncilio en Trente kontraŭreformacio emfazas la dignecon de la geedziĝa sakramento. Sed en Britio Elizabeta reĝadas 45 jarojn senedza. Renesanco estas fermita universo. Civilizacio translokiĝas de la Sudo norden.. Sude oni vivas ekstere; norde ene. Reformacio kontraŭ-ante diboĉon prilaudegas honestan famili-vivon. Lutero pentras idealan portreton de virino piema, respekto-plena al Dio. Ŝi ŝatas uzi siajn manojn por hejme perlabori sian panon; ŝi similas varŝipon, kiu alveturigas komercaĵojn de malproksime. Laŭ Kalvino, viro ĉe oficejo, virino ĉe hejmo forno: jen tia devas esti vivregulo. Oni malpezigas virinajn instru-programojn, forigas el ili la latinan lingvon, kiel signon pri vireca aŭ papeca kulturo. Nur unu libro indas: la Biblio.:

En Britio kreiĝas viraj kluboj, parte pro rigidmoreco de hejma vivmaniero, parte pro ina neklereco. En Hispanio oni almetas stangetojn ĉe fenestroj; en Venecio, urbo duon-orienta duon-germana, oni enklostrigas la junulinojn; kaj ankoraŭ pli rigidmora estas la sicilia vivmaniero pro kunestado de normanda juro kaj hispana influo. Kelkaj metioj fariĝas malpermesataj; kune kun industriigo en Anglujo malaperas panfarado, bierfarado, laktopreparado. En teks-industrio nur malaltrangaj taskoj postrestas. En silklaboro virinoj

jam ne okupiĝas pri teksado de larĝaj ŝtofovolvaĵoj sed pri ruband-kaj punto-farado. En Francio, komence de la XVII-a jarcento troveblas nur tri korporacioj: la tukkrud-istinoj, la bukedfaristinoj, la lin-kaj kanab-laboristinoj. En Nederlando, depost la jaro 1492, estas malpermesite al virinoj komerci krom pri drapaĵoj; ankaŭ esti gastej-estrinoj. Laŭ jura vidpunkto virino kundividas la sorton de neplenaĝ-ulino. Nur unu juran akton ŝi rajtas: testamenti.

En monaĥinejoj oni restarigas enan vivmanieron; tamen sankta Francisko el Sales fondas la vizitacian ordenon, kie monaĥinoj sin dediĉas al eksterdomaj taskoj: viziti la malsanulojn kaj la malriĉulojn. Sed tia monaĥinejo estas fondita en sendependa provinco Savojo. Iom poste la episkopo en Liono malpermesas la fondiĝon de simila stablo, kaj kelkajn jarojn pli poste la monaĥinoj devas ŝanĝi sian regularon kaj alpreni enklostrigitan vivmanieron.

Tiutempe perlibra civilizacio malfermas por virinoj introspektan universon. Montaigne, multe pli tolerema ol Rablezo aŭ Erasmo, konsentas, ke virinoj aliru mensan kulturon, legu ne nur la Biblion, sed pri filozofio, historio, poezio, kvankam ilia aparta rolo konsistas el prudenta hejmprizorgado. Li flegas privilegiajn rilatojn kun nebela nobelulino, Marie de Gournay, kvazaŭ lamspirita idino, kiu entuziasmiĝis pri liaj Eseoj. Kaj sur tiu nereakta, zigzaga evolu-linio ŝi fariĝas la unua ĉenero el la feminist-ularo dekseparcenta.

NORMANDAJ RAKONTOJ

de Guy de Maupassant

esperantigis R. DUPUIS

bonega traduko de ĉefverko

Prezo : 36,00 FF

NESSIE - MONSTRA MISTIFIKO

(FINO)

Fiaskoj de la fakuloj- Bedaŭrinde, ĝis nun, ĉiuj fakuloj kun sia mekanika, optika kaj elektronika sorĉilaro faris tre magran kontribuon, kaj la enigmo de "Nessie" pli firme enradikiĝis en la fundo de Loch Ness. Estas rimarkinde, ke la kvalito de fotografaĵoj pri la monstro estas tre malbona; detaloj estas malprecizaj pro la ekstrema grajneco de la negativoj. En Loch Ness, eĉ la plej bona aparato kun specialaj lensoj kaj fortega lumfonto ne povas doni kontentigajn rezultojn pro la lumbarilo kaŭzita de la suspensiitaj torf-pecetoj en la akvo. Ili reflektas lumradiojn kaj malhelpas, ke lumo penetru longan distancon. Interpretado de malnetaj fotoj estas tre riska. Ne estas sen kialo, ke tre ofte estas uzata la vorto "ŝajnas" en tekstoj klarigantaj la enhavon de publikigitaj fotografaĵoj.

La vidpunkto de la monstro-ĉasistoj estas resumebla jene: ĝis nun sukceso dependas preskaŭ tute de bonŝanco. Tio ja ne estas scienca pensmaniero. Dum la kvardek-jara celkonscia observado kaj esplorado de Loch Ness, plej modernaj sciencaj metodoj kaj teknikaj aparatoj estis uzataj fare de fakuloj en diversaj scienco-branĉoj. Cetere, oni ne povas plendi, ke la esplorado estis bremsita pro manko de mono. En iu ajn alia reserĉ-projekto, post la elspezo de tiom da tempo kaj forto-streĉo, preskaŭ certe estus okazinta iu trarompo por alporti utilajn rezultojn. Male, la esploroj de Loch Ness estas en la sama loko hodiaŭ, kie ili estis en la 1930-aj jaroj. Malgraŭ la intensigo de observado, neniu nerefutebla spuro de grandaj bestoj estis trovita en la lago. Ĉu la esplormetodoj estis misaj? Ĉu la ekipaĵo ne estis konvena? Aŭ ĉu la respondo estas tutsimple, ke la monstro de Loch Ness ne ekzistas en la realo sed estas kreaĵo de la homa imago?

Kiel kaj kial estiĝis tiu fantaziaĵo? Ĉu ĝi estis spontana aŭ rezultas el eksteraj faktoroj?

Kolektiva haluciniĝo- Estas eble dividi homojn en tri grupojn laŭ ilia sinteno pri la ekzisto de "Nessie": 1- tiuj, kiuj kredas, ĉar ili mem vidis iun beston, aŭ tiuj, kiuj kredas, malgraŭ tio, ke ili mem ne vidis ĝin; 2- tiuj, kiuj ne kredas, kaj ne kredos, pri la ekzisto de "Nessie", ĝis la monstro saltas el la akvo kaj mordas ilin; 3- tiuj, kiuj atendas por esti konvinkitaj. Estas utile pli detale ekzameni la unuan grupon kadre de la socia psikologio.

Entute inter 3 000 kaj 4 000 homoj asertis, ke ili vidis la monstron. Iliaj priskriboj similas al raportoj de observantoj de nifoj. La plej multaj kazoj estas klarigeblaj kiel konataj bestoj kaj objektoj, sed restas 15-20% da observoj, kiuj defias klarigon. Estas bone sciite, ke ordinaraj homoj ne estas kompetentaj por ekzakte observi kaj raporti. Preskaŭ ne eblas trovi du atestintojn de krimo aŭ akcidento, kiuj priskribas precize la samajn eventojn; kontraŭe, ili ofte priskribas la samajn faktojn tute malsimile.

Memsugesto ludas gravan rolon. La plejmulto de la observantoj atente rigardas la akvosurfacon de la lago kun la espero vidi la monstron. Se iu formo aperas en la akvo (flosanta trunko, ombro de nubo, peco de torfo) sugestanta bestan korpon, tiuj facile influeblaj homoj tuj akceptas ĝin, kiel aperon de "Nessie", kaj ili kontentiĝas pro tiu konfirmo de sia kredo. Kion ili volas vidi, ili ja vidas, ĉar la tuta procezo disvolviĝas en ilia cerbo.

Ankoraŭ unu konstato estas, ke netrejnita observanto ĉiam inklinas al interpreto de novaj, antaŭe ne spertitaj fenomenoj, laŭ siaj propraj travivaĵoj kaj scio. Pro tio ili facile preteratentas specifajn detalojn kaj anomaliojn, kiuj povas esti tre signifplenaj. Ekzemple, multaj raportoj pri la besto de Loch Ness mencias trajtojn de konataj akvobestoj, kiujn la observantoj jam vidis en la naturo, en

akvarioj, en ilustritaj libroj aŭ en filmoj.

En epoko de mirinda scienca kaj teknika progreso, Loch Ness spegulas homan bezonon kredi pri fantaziaj aferoj. Ne malpli ol en la pasinteco ekzistas nuntempaj mitologio kaj legendoj. Sub konvenaj psikologiaj kaj naturaj kondiĉoj, ĉiu generacio trovas por si iluzion, al kiu amaso da homoj volonte kredas. Estiĝas kolektiva haluciniĝo, kies specifa formo estas kulture dèterminita. Marmonstroj kaj marserpentoj apartenas al la tradicio de la Okcidenta Civilizacio. Menciindaj estas la behemoto, levjato kaj Rahabo de la Biblio, la plurkapa helena hidro, Fajniro de la norvega mitologio kaj la skandinavia mezepoka Krakeno. "Nessie" apartenas al la sama familio.

Eskapismo en sakostrato- En la kazo de la monstro de Loch Ness, la fakto, ke pluraj homoj dum preskaŭ duonjarcento estas ligitaj per donkiĥoteska entuziasmo kaj kredo pri la realo de bizara afero, kreas komunan sintenon inter la partoprenantoj, la monstro-ĉasistoj. Plue, la komuna agado de tiu grupo de fervoruloj estas speco de eskapismo same kiel spektad-sportoj, la televido kaj la kinejo.


La tuta historio de esplorado pri la monstro de Loch Ness estas karakterizita per romantikismo kaj mistero. La lastatempa aplikado de precizaj sciencaj metodoj apenaŭ ŝanĝas tiun pli fruan aspekton. Ĉar sciencistoj ankoraŭ ne trovis la monstron, la fideluloj devas atendi kun espero kaj elpensi klarigojn pri la sciencaj fiaskoj. Dume, ilia kredo neniel ŝanceliĝas, kaj la amasa haluciniĝo daŭras.

Profitdona turismo- Fine, estas necese pritrakti ankoraŭ unu aspekton de la fenomeno de Loch Ness, kiu estas nek imagita nek mistera; temas pri mono! Unu el la malicaj klaĉoj aŭdigataj pri la monstro de Loch Ness estas, ke ĝi estas inventaĵo de la tiea Turisma Instanco. Nu, ja estas evidente, ke la turisma industrio de la skotlanda montara

regiono rikoltas bonan profiton dank'al "Nessie". Loch Ness fariĝis unu el la plej frekventataj vidindaĵoj, kaj en la Kaledonia Kanalo, kiu lastatempe perdis multe da trafiko, veturas speciala pasaĝera vaporŝipo. Printempe la tieuloj atendas la "stultan sezonon" (angle: silly season), kiam monstrofebros atakas arojn da aŭtomobilistoj, skoltoj, ekskursantoj kaj alispecaj scivolemuloj. En la ĉirkaŭaĵo de Loch Ness kreiĝas karnavala etoso, hoteloj pleniĝas kaj vendistoj de suveniroy riĉiĝas.

Dum la vesperaj horoj la homoj ariĝas en drinkejoj por rakonti pri siaj travivaĵoj kaj pridiskuti detalojn rilate la formon kaj dimensiojn de "Nessie". Por ne malmultaj ĉeestantoj la monstro de Loch Ness fariĝas pli reala en la bier-kruĉo ol en la akvo de la lago. Apude staras raportistoj de gazetaĉoj, avide notante ĉiujn atestaĵojn por posta disvastigo sur la presita paĝo. Tiel, jaron post jaro, pli firme enradikiĝas la legendo. Kontraŭ tiuspeca mitomanio neniom utilas la racio kaj la scienco.

Bernard GOLDEN



Mi pagis mian abonon ĝusta tempe.
Kaj vi?

al P. Babin, poŝtkonto Nantes 281361L
aŭ al via peranto: vidu liston sur la
lasta kovrilpaĝo

LA DERVIŜO

RAKONTAS

La justa Sultano- La turkoj tre ofte parolas pri Soliman la Justa. Tiu suvereno estis severa, eĉ kruela, sed li ŝatis justecon kaj deziris diskonigi tiun informon en sia tuta imperio. Liaj juĝofaroj fariĝis modeloj de juroscienco, kiuj mirigis kaj eĉ mirigos la aktistojn dum generacioj. Tamen lia kompreno de justico estis foje stranga.

Iam, majeste sidanta sur sia trono superstarita de la ora krescento, li akceptis pledantojn ĉiuspecajn. Lia Viziro venis al li kaj flustris en lian orelon, ke la loĝantoj de apuda vilaĝo rifuzis pagi la imposton. Soliman paliĝis pensante, ke, krom insulto al li, tiu rifuzo estis danĝera faro al li, pro risko de disvastiĝo tra la tuta imperio.

Inspirite de Alaho, la Sultano trankvile pripensis: "Necesas sentigi al tiuj hundaĉoj la pezon de mia justico. Sendu oficiron kun cent soldatoj, kiuj bruligos la vilaĝon, mortigos la loĝantojn, per kies kranioj oni konstruu turojn nepereigeblan, kiu memorigos al ĉiuj miaj regatoj, ke mia justico povas frapi plej severe. Super tiu turo, vi starigos mian standardon kun la surskribo: Jen la justico de la Sultano."

La Viziro obeis la ordonon de sia mastro. La postan tagon la oficiro revenis al la palaco kaj detale raportis pri la plenumo de lia deziro. Li ricevis rekompencan. Sed kelkajn horojn poste diskonatiĝis la informo, ke la oficiro detruigis alian vilaĝon ol la celitan. Soliman ekkoleregis: "Mi restos la Justa por ĉiuj. Arestu tiun oficiron, senkapigu lin kaj starigu lian kapon supre de la turo en tiu vilaĝo. Mia standardo pravos, kiu diras: "Jen la justico de la Sultano".

Post momento revenis la Viziro: "Sultano moŝto, ne eblas obei vian ordonon, ĉar la kulpa kapitano sin ĵetis en la maron kaj ne eblas trovi lian kadavron". Soliman

sentis la situacion gravega. Ekzemplo fariĝis urĝe necesa. Kiamaniere resti "la Justa" por la sekvantaj generacioj? Li profunde pripensis kaj, levante la kapon, kun majesta, gravega mieno, li diris: "Prenu alian kapitanon, metu lian kapon supren sur la turo apud mia standardo. Miaj popoloj tiamaniere vidos, ke nenio haltigas la justicon de la Sultano."

La vestaĵo faras la religiulon-

Iam, promenante tra la urbo, Nasr-ed-Din, la derviŝo, aŭdis ĝojan muzikon, kaj vidis, ke antaŭ iu domo ariĝis homoj. Oni diris al li, ke la plej aĝa filo de la posedanto de tiu domo ĉitage edziĝos. Estis ofertita festeno al ĉiuj homoj, kiuj bonvolis eniri.

La religiulo multe ŝatis la festojn kaj festenojn. Li eniris la domon; sed liaj vestoj estis tre ordinaraĵoj, ĉiutagaĵoj, ne festaj, kaj la servistoj kondukis lin al sidloko, ĉe la ekstremo de la tablo. Nasr-ed-Din kontentiĝis per tio sed li baldaŭ konstatis, ke en la pladoj, kiuj alvenis al li restis nur odoraj, sed senvaloraj pecetoj. Li ekfuriozis kaj reiris hejmen, kie li surmetis siajn belajn religiajn vestaĵojn. Kiam li revenis, la posedanto de la domo donis al Nasr-ed-Din la honor-sidlokon kaj la servistoj venis kun pladoj plenaj je plej bonaj manĝ-pecoj. Kiam lia telero estis plena, la religiulo prenis ĝin kaj verŝis la entenon sur sian belan robon dirante: "Manĝu!". Mirante la gastiganto informiĝis pri la kialo de tiu gesto. Nasr-ed-Din digne respondis: "Juste estas, ke mi donis al miaj vestaĵoj ilian parton de tiu festeno. Kiam mi eniris vian domon, vestinte kiel ĉiu bona islamano mi ricevis nur kelkajn manplenojn da rizo. Nun mi ricevas riĉan manĝaĵon. Tamen mi estas la sama homo. Do, tiun pliaĵon da honoro kaj manĝaĵo mi ŝuldas al miaj vestaĵoj.

G. Kersaudy - trad. P.B.

POR VIA DISTRO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	S	E	P	T	E	M	B	R	A
2	E	K	R	A	N	O			E
3	M	I	A	Ŭ	I			A	M
4	A	P	O	G	R	E	L	O	J
5	J		N	A	I	V	U	L	O
6	N	E	K		S	I	D	A	
7	O	B	L	O		T	E	D	A
8	F	L	I	R	T	E			O
9	I		N	O	R	M	O		L
10	N	J	O		E	A	S	T	O

NOVA ENIGMO

Silab-enigmo- BLE BRA CED DO DO FLA FO FRA GRI HAV HUN KI
 KI KI KO KO KO KO KOF KRE KRI KRO KRU KRU LAK LIB
 LIN LO MAR MAR MAR MEL MO NI NO PAS PET RO RO RO
 RO RO STE SVE TA TO TO TO TO TRE TRI VA VOS ZA.

El la supraj 56 silaboj formu 28 dusilabajn kaj kvinliterajn vortojn kun la jenaj signifoj:

1. Infannutraĵo - 2. Grava malbonfaro - 3. Korpoparto - 4. Tagnomo -
5. Homa korpoparto - 6. Plej bona amiko - 7. Fari maŝteksaĵon - 8. Tutmonda mono - 9. Elpremadi lakton - 10. Koloro - 11. Nomo de monato -
12. Ceremonia jako - 13. Besta korpoparto - 14. Skandinava mono - 15. Vojaĝa portilo - 16. Vira nomo - 17. Lerneja skribilo - 18. Sovaĝa katego-
19. Tre dekliva - 20. Alta arbo malgrandazia - 21. Kriaĉi - 22. Germana mono - 23. Perdi la konscion - 24. Franca havenurbo - 25. Ludkartkoloro
26. Fidela amiko - 27. Koloro - 28. Granda festo:

La mezaj literoj de la vortoj formas proverbon, kies pravecon ofte pruvis historiaj faktoj, kaj kiu estas averto al krimuloj kaj potenculoj.

LA VIVO EN GRESILLON

La Esperanto-Domo ek- kaj plu-vivis dank'al la laboro de pluraj geamikoj. Unu el ili, fidela de la naskiĝo de la esperantista Gresillon, daŭre laboras jam de 42 jaroj por ĝi. Ŝi rakontas sian esperantistan vivon:

"Jojo naskiĝis en 1909 en vilaĝo de tiu franca regiono nomata "Valo de Loire (Luar)". De sia naskiĝo, ĉe gepatroj samtempe metiistoj kaj komercistoj ŝi estis ĉirkaŭata de homoj plej diversdevenaj, laŭ la momentaj altiroj aŭ devigoj, jen meze de la hejmo-kerno mem, jen en la patra laborejo, jen en la magazeno kun klientaro diversaĝa. En tia medio ŝi ne povis konscii pri sociaj diferencoj, kiam, senescepte, ĉiuj estis afablaj al ŝi, scivolema kaj petolema infano. Tre juna, Jojo interesiĝis pri ĉiuj interbabiladoj, pri ĉiuj presaĵoj (almenaŭ pri ties bildoj!). Je horoj de paŭzo unu el la laboristoj trejnigis ŝin al rekono de alfabetaj literoj kaj ankaŭ de pejzaĝoj, vizaĝoj de eminentuloj. Neniam ŝi restis enfermata en ŝlosita cirklo.

Jen la 4-a de aŭgusto 1914, kvina datreveno de Jojo, sed, ho ve, ankaŭ dato de milit-eksplodo, kiu pli malpli enkondukis gravajn ŝanĝojn en la mensoj, kiel en la vivmaniero de la homoj. Subite la patro de Jojo devis forlasi ĉiujn taskojn, adiaŭi la familianojn, kiujn li revidos nur kvar jarojn kaj duonon poste, ĉar li estis milit-kaptita. Plej abrupte la patrino de Jojo iĝis estro de la familia afero. Kuraĝe ŝi surpronis ĉiujn taskojn, helpata nur de maljunaj laboristoj aŭ de adoleskoj, kiam la klientaro plej grandparte ina, venis al la magazeno ne nur por aĉeti, sed ankaŭ por interŝanĝi novaĵojn. Iom post iom, spite al ĉiam pli kruelaj eventoj, la urba kaj la kampara vivo pluiris je novaj ritmoj. Iun dimanĉon ekaperas en la patrina vendejo nova klientaro; estis germanaj milit-kaptitoj, kiuj, en najbara ŝtat-arbaro devis dehaki trunkojn kaj fari el ili fostojn por subteni la francajn frontajn tranĉeojn. Ili venis enkadrigataj de gardantoj kaj pli malpli facile esprimis siajn aĉet-dezirojn. Ofte, la patrino ekploris dirante: "Ha, malfeliĉuloj! Same kiel vi mia edzo suferas je kaptiteco". Ankaŭ la aĉetantoj montris malgajajn mienojn. Mirigita Jojo pensis: "Do ne ĉiam la germanaj militistoj estas "homaĉoj", kiel oni diras en la vilaĝo". Iam Jojo ricevis leteron de la patro: "Momente, mi laboras en farm-bieno por anstataŭi viron senditan al batal-kampo. Restas, kun la patrino, filineto samaĝa kiel vi, Lizbeta. Kvankam ŝi, kun bluj okuloj kaj helblonda hararo, ne vere similas vin, tamen, rigardante, aŭskultante ŝin, mi pli facile imagas viajn progresojn. Kun ŝi mi lernas germanajn vortojn, kaj al ŝi mi enkapigas francajn". Jojo pensis: "Do, la etaj germaninoj ne diferencas de la francaj. Lizbeta, amata de mia patro, estas kvazaŭ fratino mia! Sed kial tia diferenco en parol-uzado?" Dume, en la lernejo, la instruistino, fervora patrioto, helpe de grandaj geografiaj mur-mapoj, elvokis la evoluadon de la bataloj sur la diversaj frontoj.

Kaj alvenis la Usonanoj. En tiu Loire-valo, transit-vojo de la Oceanaj havenoj al la nordo kaj oriento, estis kreitaj milit-haltejoj kun uzo de ĉiuj disponeblaj lokoj. La vilaĝo konis novan intensan vivon. Jojo, daŭre scivolema, ne povis ne miri pri la diverseco de la rasoj. Imagu, estis eĉ nigruloj! Ne multaj povis sin esprimi en la franca lingvo. Ambaŭflanke oni ĵargonis. Jen venas soldato petante permeson uzi ilon. Li malfacile sciigas, ke li estas grek-devena, kaj liaj gepatroj elmigris al Usono. Li sopiras pri la pragatra lando, kies lingvon kaj kulturon li iom konas. Jojo, nun naŭjara, provas ĉion kompreni. Sed ŝokita de tiom da malfacilaĵoj ŝi decidas, ke ŝi lernos la anglan lingvon. Ŝi komencas balbuti kelkajn usonajn esprimojn, kiam okaze de festoj, kun aliaj junulinoj vestitaj laŭ Alzaca kaj Lorena stiloj, ŝi oferdonas florbukedon al usonaj oficiroj. Tamen, jam, en malnova

almanako ŝi legis pri Universala Lingvo, nomata Esperanto, pere de kiu ĉiuj homoj povus interrilatiĝi.

Monatoj pasas. Jen la Armistico. Kelkajn tagojn antaŭ la Naskiĝfesto, la patro revenas. En germanaj uzinoj, li elprovis novajn maŝinojn, novajn labor-progresojn. Jojo partoprenas en solenaĵoj, kiuj rememorigas pri milit-mortintoj. Sed la reveninta paco generas viv-ĝojon ne detruoblan. Ĉiokaze oni kantas, dancas, festas. Kiam ŝi estas dek-du jara la filineto Jojo retrovas sian veran nomon, Berenĝera. Jaroj pasas. Berenĝera fianĉiĝas, edziniĝas, patriniĝas. Pro la profesio de la edzo ŝi loĝas en Parizo. Ĉu ŝi forgesis Esperanton? Ne, tute ne! Ŝi ne povis iri Brition por perfektigi siajn konojn de la angla lingvo. Ŝi avidas al persona lernado de facila unuversala lingvo. Nelonge post havigo de radio-aparato, ŝi aŭdas pri Esperanto-lecionoj, kiuj kompletigas perlibran lernadon. Eĉ mastrumante, kiam la junaj filoj komencas frekventi lernejon, ŝi enkapigas esperanto-vortojn kaj gramatikon.

Ve! Dua mondmilito eksplodas, ankoraŭ pli terura por la civiluloj ol la unua. La edzo, pro la profesio, venigas la familion al la Loire-valo, kies urboj ankaŭ suferis gravajn detruojn. Paco revenas. La infanoj adoltiĝas, plustudas en Parizo. Ĉu, por la patrino ne estus la tempo trovi eksterajn, interesajn kontaktojn? Certe, jes! Des pli entuziasme, Berenĝera revenas al Esperanto, ĉar lokaj gazetoj mencias la renaskiĝon de la urba esperanto-klubo. Bona okazo por vera ekflugo, kune kun la edzo liaflanke konvinkita pri la valoro de tutmonda interkomprenilo. Pli kaj pli aktive Berenĝera partoprenas en la loka Esperanto-vivo, havas la grandan ĝojon akcepti, post la milito, je la nomo de la loka klubo, en oficiala urba kadro, la unuan grupon de germanaj samideanoj; tio post, kaj antaŭ, multaj aliaj el diversaj landoj, en la urbo mem, aŭ en la Esperanta Kultur-domo Gresillon.

Poste, plenplena estis ŝia vivo, eĉ post la eliro de la filoj al kreado de propraj hejmoj, eĉ post la forpaso de la kara edzo, kun kiu ŝi partoprenis en tiom da en- kaj ekster-landaj esperanto renkontiĝoj.

El tiom da personaj spertoj, Berenĝera povas konkludi dirante, ke la praktikado de Esperanto forpuŝas senton de egoismo. Ŝi donas la impreson aparteni al granda familio, mezê de junaj kaj maljunaj, novaj kaj malnovaj geamikoj diverslandaj. Kaj tiel, por ŝi, estis solvita, almenaŭ parte kaj persone, la pridemandoj de la fruaĝo, fronte al nekomprenebleco inter homoj diversdevenaj.

B. CHEVERRY

LIBRO - SERVO

Fratojoble ni estas - Paroloj de la ĉefo Seattle	36 ff
Kion travivis aŭstria familio en la brazila praarbaro	70 ff
Survoĵo kun Gango (Reinhardt) - verkita de manuŝaj infanoj	30 ff
Temuĝin, la fib de la ĝangalo, de T. Sekelj	30 ff
Vojaĝo al disiĝo, de S. Štimec	42 ff


(+ sendkosto)

Petu katalogon de S-ino J. Vincent, 26bis, rue de Milngavie, 4150 BAUGE

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Via opinio pri la adverba participo estas tute prava : adverba participo povas esti uzata nur tiam, kiam ĝi rilatas al la subjekto de la frazo. Se ni deziras per participo esprimi la sencon : « kiu...-as », tiam ni devas uzi nepre la adjektivan formon de la participo ; la adverban formon ni uzas nur anstataŭ : « kiam li (ĝi, ŝi, ktp)...-as » aŭ « ĉar...-as ». Anstataŭ : « la unuaj vojaĝantoj, kiuj traveturas Eŭropon », ni devas diri : « traveturantaj ». La vorto « traveturante » signifus : « kiam ili traveturas ».

(L.L. Zamenhof — « Lingvaj Respondoj »)



Senpetaliginte ĉiujn lekantojn, mi ankoraŭ ne scias ĉu mi amas vin.



Mendante la manĝon la unuan fojon en la franca lingvo, mi esperas ke mi ne eraris.



Mi vidis multajn interesajn aferojn vizitante Afrikon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (8 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).

Germanujo : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^e-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ (2.800 esk.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34